Kieskeurig (Tand in goede staat)

Koepon (Nachtgewaad voor rund)

Magazijn (Persoon die azijn lust)

*Eileider (Vooraanstaande kip)*



Minimaal (Sobere maaltijd)

Oordeel (Lel)

Panama (Moeder eerst)

Papier (Zwaarlijvige Ier)

*Politicus (Zoen van een politieagent)*





Postwezen (Kinderen van doodgebeten postbodes)  
 Profeet (Professor aan tafel)  
 Rijkdom (Financieel sterk blondje.)  
 Theoloog (Theo vertelde de waarheid niet)  
 Toezicht (Opletten met gesloten ogen)  
 Uitzonderlijk (Begrafenisondernemer op reis)  
 Uurwerk (Werk dat per uur betaald wordt)  
 Vertrouwen (Op een afgelegen plaats trouwen)  
 Verzuipen (Drinken in het buitenland.)


## **Aĉu vi sciis ke... / Wist je dat...**

... mieren afstanden precies kunnen uitrekenen met hun poten. Op deze manier kunnen mieren altijd hun nest feilloos terugvinden.



Om hun richting te bepalen kijken ze naar de lucht en maken ze gebruik van de lichtinval. Maar hoe ze de afstand berekenen was tot nu toe altijd een mysterie voor wetenschappers. Het nieuwe onderzoek toont aan dat de mieren daarvoor gebruik maken van een soort

ingebouwde stappenteller.



kunnen afstanden

Door deze twee technieken te combineren, bijvoorbeeld woestijnmieren enorme door de Sahara afleggen, zonder dat ze de weg terug naar hun nest kwijtraken. Voor de richting kijken ze naar de lucht, voor de afstand tellen ze hun stappen. Op die manier hoeven ze niet hun eigen spoor terug te volgen, maar kunnen ze een snellere route nemen zodra ze terug willen naar het nest.

... mezuma persono faras tage 8000 tot 10000 paŝojn? Io egalas al multaj kilometroj kaj adiciate tio signifas ke en via vivo vi marŝos 185000 km, tio estas pli ol kvarfoje ĉirkaŭ la mondo.


... vi 30% de via tempo serĉas informojn kaj ke la kvanto de informfluo kiuj estas disponeblaj ĉiujn 9 monatojn duobliĝas?



... kreskas 15.000.000.000 kafaarbustoj en la tropika zono ĉirkaŭ nia terglkobo kaj ke 2 kafaarbustoj liveras

mezume 1 kg da kafo en jaro?

... de wijngaardslak waarschijnlijk door de Romeinen in onze omgeving is geïntroduceerd en zich in Zuid-Limburg permanent gevestigd heeft?



... het brein uit zo'n 100 miljard neuronen bestaat? Om te vergelijken: als we 100 miljard (dat is 100 met 9 nulletjes achter, 100 000 000 000) 1 euromunten tegen elkaar zouden leggen (1 muntstuk is zo'n 2,5 mm dik), dan zouden we ongeveer 8 keer rond de aarde kunnen!

...het brein van een volwassen mens tussen 1300 en 1400 gram weegt, dat van een pasgeborene tussen 350 en 400 gram. Onze hersenen maken 2 % uit van ons totaal lichaamsgewicht.


Om te vergelijken:

brein van een olifant = 6000 g  
 brein van een chimpansee = 420 g  
 brein van een beagle hond = 72 g  
 brein van een kat = 30 g  
 brein van een rat = 2 g

... vi ne kapablas leki vian kubuton.

... een krokodil zijn tong niet kan uitsteken.

... bij het bestuderen van meer dan 20.000 struisvogels gedurende de laatste 80 jaar, er geen enkele keer is vastgesteld dat een struisvogel zijn kop in het zand stak.



... porko fizike ne kapablas rigardi la aeron?

... tutmonde 23 % de la paneoj de fotokopiiloj rezultas el tio ke homoj provas fotokopii siajn postaĵojn?

... gedurende de gemiddelde levensduur een slapend persoon ongeveer 70 insecten en 10 spinnen inslikt?

... 85 % de la homoj, kiuj legis ĉi tiun "ĉu vi sciis ke..." provis leki sian kubuton ☺ ☺ ☺ ☺

## **ANTVERPENO FESTAS**



pro 100-jara ekzisto de la klubo « La Verda Stelo »

per

### **INTERNACIA RENKONTIĜO**

**Pentekosto : 26,  
27 kaj  
28/05/2007**

#### **PROGRAMO :**

Prelegserioj  
Kunveno  
Turisma programo  
Vesperaj programoj  
Festaj manĝoj

#### **JUBILEO**

La Verda Stelo ne estas iu el la plej aĝaj kluboj. Ĝi eĉ ne estas la plej aĝa klubo en Antwerpen. Sed sendube ĝi estas kaj restas iu el la plej fortaj kaj aktivaj kluboj en Esperantio. Depost ĝia fondiĝo okazas ĉiusemajne kunveno (kun nura interrompo dum la du mondmilitoj)

## FESTO

Unu el la fortaj flankoj de la grupa vivo estas la internacieco de la kluba vivo. Interalie pro ĝia situo, meze de Eŭropo, proksime al la centra oficejo, la klubo ofte invitis eksterlandajn gastojn.

La membroj multnombre prezentigas en internaciaj aranĝoj kaj kunvenoj. La plej evidenta ebleco por festi centjariĝon estas organizo de internacia aranĝo.

La fondo de la grupo okazis en la 23a de januaro 1907. Tio ne estas la plej oportuna momento por venigi eksterlandanojn. En tiu dato la klubo festos en intima rondo. La klubo jam eldonis 3 broŝurojn pri la kluba historio de la antaŭaj kvaronjarcentaj periodoj. Ĉi-foje aperos luksa eldono pri la centjara kluba tradicio. Sed je Pentekosto, ni prezentas ambician programon kaj atendas parto-prenantojn el multaj landoj.

## TRADICIO

Antwerpen havas tradicion de Internaciaj Aranĝoj. Ĝi akceptis 3 Universalajn Kongresojn. De 1993 ĝis 1998 tie ĉiujare okazis turisma semajnfina aranĝo.

## PROGRAMO

Por kontentigi ĉies guston ni ellaboris paralelajn programerojn el kiu oni povas elekti :

### Prelegserio « Kulturo de la Kluba Vivo »

Kluba vivo ŝajne estas esenca en la Esperanto movado. Klubo povas havi diversajn rolojn : por la plej fervoraj ĝi estas loko por praktiki la lingvon kaj konatiĝi kun eksterlandanoj, por iuj ĝi estas precipe renkontiĝejo de amikoj, ĝi povas ankaŭ roli kiel informocentro pri la movado ...

En sabato kaj dimanĉo, 4 eminentaj prelegantoj prilumos la temon kaj poste la publiko diskutos pri ĉiu prelego.

### Renkontiĝo de Vikipediistoj

Diversaj kunlaborantoj de Vikipedio renkontiĝos. Ili volas emfazi la internacian kunlaboron en tiu kreskanta informfonto. En la Esperanto-centro disponeblas serio da rete konektitaj komputiloj, tiel ke kunlaborantoj kaj interesitoj povos labori kaj demonstracii.

### “Esploru Antverpenon”

Spertaj esperantistoj ĉiĉeronos vin por konatiĝi kun turismaj allogaĵoj de la urbo. Ni petos al vi por indiki viajn preferojn, ĉar ni zorgos por ne tro grandajn grupojn.

Muzeo Mayer van den Bergh-pentraĵoj mezepoko (€ 4,00)  
 Vizito al la katedralo (€ 2,00)  
 Antwerpen miniature (€ 6,50)  
 Muzeo plantin-presarto (€ 6,00)  
 Buĉista domo- pri muziko kaj muzikiloj (€ 3,00)  
 Loĝejo de Rubens (€ 6,00)  
 Muzeo pri fotoarto (€ 6,00)  
 Muzeo pri navigado (€ 4,00)  
 Muzeo pri etnografio (€ 4,00)  
 Muzeo pri diamantoj (€ 6,00)  
 Muzeo pri belartoj (€ 6,00)  
 Orientiga promenado en la malnova urboparto  
 Promeno al juĝejo, rimarkinda ekzemplo de moderna arkitekturo.

### **Vesperaj programoj**

En sabato 26/05/07, ni regalos vin per koncerto de la plej profesinivela, poliglota, varia muzikisto en Esperantio, nome JOMO.

En dimanĉo 27/05/07, kun popolmuziko kaj dancado, vi povos mem aktivi. Profesiaj muzikistoj koncertos kaj prezentos popoldancojn, sed en moderna vesto kaj post mallonga prezento instruos dancojn al la publiko.

### Manĝoj

De vendredo vespere ĝis lundo tagmeze, klubaj volontuloj mem prizorgos la manĝojn. Tiel vi povos ĝui festajn manĝojn por malalta prezo. Ili ankaŭ servos trinkaĵojn je prezoj malsuperaj al tiu de publikaj trinkejoj.

- \* Infanoj ĝis 5 jaroj = senpage
- \* Infanoj inter 5 kaj 12 jaroj – 50%
- \* Vendredovespere € 10 varma
- \* Sabatotagmeze € 5 pan-bufedo
- \* Sabatovespere € 15 vera resta bufedo + Jomo
- \* Dimanĉotagmeze € 5 pan-bufedo
- \* Dimancovespere € 12 varma + popolbalo
- \*\*\*\*\***Rabatprezo:** sabato + dimanĉo + lundo = € 38,-



### Loko

La renkontiĝejo estos la Esperanto-domo, Frankrijklei 140. Tie ankaŭ okazos la prelegoj “Kulturo de la Kluba Vivo” kaj la renkontiĝo de Vikipediistoj.

Sed la manĝoj, la jubilea festoj kaj la vesperaj programoj okazos en pli grandaj salonoj, en vidal- vida lernejo: Frankrijklei 91.

AliĝkotiĝoAntaŭ 31/12/06

Sabato € 5,00

Dimanĉo € 5,00

Lundo € 3,00

Post 1/01/07

€ 8,00

€ 8,00

€ 6,00

Infanoj ĝis 12 jaroj = senpage

Tranoktado

Ni kontaktis hotelojn en 2 kategorioj: malmultekostan sed malmodernan Terminus Hotelo (1,5km de nia kongrescentro), pli multekostan sed modernan Ibis Hotelon (100m de nia kongrescentro). La du hoteloj estas kun banĉambro kaj matenmanĝo. Bedaŭrinde la junulargastejo estos plenplena en tiu periodo.

Ni ankaŭ disponas pri listo de membroj, kiuj pretas gastigi. Sed por iom subteni niajn volontulojn, ni petas malgrandan kontribuon por po ĉambro kaj nokto:

Hotelo Ibis 1p. € 92, - 2p. € 102,-

Hotelo Terminus 1p. € 68, - 2p. € 74, - 3p. € 80, - 4p. € 99,-

Ĉe Esperantisto 1p. € 10, - 2p. € 15,-

**Petu la alsendon de faldfolio / aliĝilo kun detaloj ĉe:**Esperanto Antwerpen - [jubileo@scarlet.be](mailto:jubileo@scarlet.be)

Jam nun notu la daton en via agendo

**Pentekosto : 26, 27 kaj 28/05/2007**

## **Pri U.K. en Vilnius** **(LT)**

### **Unu lingvo por la** **tuta mondo**

2005-07-24 14:03:03

*Jen kion la urbestro de Vilnius, kelkajn horojn post la oficiala malfermo de la U.K. en sia urbo, publikigas en sian personan retejon.*


Salutojn, ĉi someran dimanĉan posttagmezon. Hodiaŭ mi havis la okazon partopreni en speciala evento, kiu havigis ankaŭ ideojn por pri skribi tiun ĉi tagon. En Vilnius kunvenis du kaj duono mil ŝatantoj de la lingvo Esperanto, du mil el ili estas gastoj el pli ol sesdek landoj. Mi ne scias ĉu eblus memori alian tiom buntkoloran eventon en Vilnius, en kiu partoprenus reprezentanton el tiom radikale malsamaj kaj eĉ inter si ne pacaj landoj. Kaj ĉiuj parolis unu lingvon, kaj ko estas plej grave – komprenis unu la alian.

La nekomunikado inter homoj, ŝtatoj kaj tutaj nacioj estas unu el la plej seriozaj problemoj de mondo sen limoj. Eblas diri, ke la angla lingvo pretendas esti monda lingvo, sed tio tre vundas la francojn, kaj certe ne konvinkas ĝin lerni loĝantoj de hispane parolantaj landoj. Neniu rajtus juĝi pri la prioritato de lingvoj de alia ŝtato, ĉar samtempe ni juĝus ankaŭ pri la prioritato de tiu ŝtato kaj de ĝiaj socio, religio kaj

mondpercepto. Pro tio la ideo de doktoro Zamenhof, vivanta en la deknaŭa jarcento kaj kreinto de la lingvo Esperanto, montriĝas ankoraŭ nekredeble nuntempa. Ja tiutempe oni ankoraŭ ne parolis pri tutmondigo, sed la en Pollando naskiĝinta kaj en la malgranda Litovio vivinta junulo ekde elkresko revis krei lingvon, kiun povus interparoli la tuta mondo. Kaj por neniu ofendi, krei tiun lingvon, kiu uzas multajn detalojn el aliaj lingvoj. Do estis la ideo, ke homoj el la tuta mondo krom la denaskan lernu ankoraŭ unu lingvon, en kiu ili povus paroli kaj kiun oni komprenus ĉie.

Vere, pro diversaj historiaj cirkonstancoj, Esperanto ne iĝis tutmonda lingvo, kaj niatempe ĝin parolas eble ĉirkaŭ 4 milionoj da homoj, pliaj kelkaj dek milionoj estas aktive interesataj. Tial tio estas nur guto en la oceano de lingvoj kaj ŝtatoj, tamen antaŭ jaro estante en la granda Ĉinio, taŭgas vidi, kiel eĉ altaj oficistoj de ĉi tiu ŝtato parolas pri subteno al Esperanto. Se la Ĉinoj ellernas la lingvon Esperanto, tiam certe ĉi tiu lingvo iĝos la plej grava en la mondo.

Sed plej gravas tio, ke la ideo pri antaŭ iom pli ol cent jaroj aperinta monda lingvo restu viva, kaj la ligoj de ĝia aŭtoro kun nia eta Litovio estas speciale signifoplenaj. Ĉiun fojon, renkontante tiajn faktojn kaj trovante similan historion, mi raviĝas pri la homoj, kiuj ne timas revii, ne timas deziri pli ol kion permesas epoko kaj situacio. Vere kuraĝe ili estus aliecaj. Kaj tio estas tre brava. ■



België – Belgique  
P.B.  
3000 Leuven 1  
2/2668

# Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift  
September 2006

jr. 27 nr. 4

Dumonata revuo  
Septembro 2006

V.U. Goris Roger, R. Menadastraat 44, 1320 Hamme-Mille Afgifte : 3000 Leuven 1


En ĉi tiu numero :

Kulturmarkt  
Algemene informatie  
Een kleine taalles  
Ĉu vi sciis ke...?  
Jubileo La Verda Stelo  
U.K. Vilnius

**Kijk naar de**  
**cursusinformatie**  
**met gratis proefles!**

**Nodig je vrienden uit**





## Programma Esperanto

### 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort', Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld. Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

Di. 03/10	<b>Wekelijkse avondcursus</b> Esperanto (lesgever: Ivo Schenkel), Winksele: 3, 10, 17, 24, 31 okt. - 7, 14, 21, 28 nov. - 5 dec. - wo.13 dec.2006	19.30 - 22.00
Wo. 11/10	<b>Vespero 3000:</b> Universala Kongreso, Florenco (Frans Croon) = met foto's en nabespreking	19.30 - 22.00
14&15/10	<b>Spoedcursus</b> Esperanto (mits voorinschrijving: esperanto3000@esperanto.be of 010/86.01.12)	09.00 - 17.00
Wo.25/10	<b>Vervolg</b> cursus Esperanto	20.00 - 22.00
Wo. 8/11	<b>Vespero 3000:</b> programo anoncota en nia retejo	19.30 - 22.00
Wo. 22/10	<b>Vervolg</b> cursus Esperanto	20.00 - 22.00
Wo. 13/12	<b>Zamenhof-Vespero 3000:</b> zie het programma in ons volgend nummer met onze traditionele gratis smultaart!	19.30 - 22.00

**ESPERANTO 3000**

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,  
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo  
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso / Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be  
Baron Descamps laan 77, 3018 Wijnmaal  
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320  
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;  
r.goris@versateladsl.be  
Frans Croon (voorz.), Bukenstraat 16,  
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;  
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap E. 3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 25,00 =  
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)  
**nieuwsbrief** = gratis: zie onze webstek  
<http://www.esperanto.be/esperanto3000/>

**Membreco / Lidmaatschap UEA**

membro/lid UEA = € 9,00  
same/idem + jarlibro = € 22,00  
same/idem + Esperanto € 56,00

**Abonoj / Abonnementen (2005)**

Esperanto 3000 = € 12,50 (nl/co)  
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)  
Horizon-taal = € 25,00 (nl/co)  
Monato = € 46,00, por ĉiuj (eo)  
Ret-Monato = € 27,60, por ĉiuj (eo)  
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)  
Enigmo € 4,50 por 2 numeroj (eo)  
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)  
Esperanto (UEA) = € 36,00 (eo)  
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)  
Ret-info = € 21,00? (eo)  
La gazeto (OSIEK) = € 27,00 (eo)  
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)  
Kontakto = € 22,00, komencantoj (eo)  
Komencanto = € 15,00, komencantoj (eo)

**Reklamo / Reclame**

1 p. € 10, 1/2 p. € 6, 1/4 p. € 4, 1/8 p. € 3  
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

**Ĝenerale / Allerlei**

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn  
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk  
de gewenste categorieën aan te geven.

Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van  
Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor  
teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

De la (tre provizora) redakcio

Dag mensen allemaal,

Dit is een noodnummer met een  
noodoproep: er hebben zich nog  
geen kandidaten gemeld voor de  
redactie van ons tijdschrift.

Het ziet er naar uit dat het volgende  
nummer niet alleen het laatste van  
2006 wordt maar helaas ook het  
laatste van de hele reeks, een reeks  
die al in 1979 startte samen met de  
geboorte van uw vereniging zelf.

Of daagt er toch nog iemand op?  
We blijven (gematigd) optimist...

In elk geval: hier ligt toch weer het  
programma van de volgende  
maanden aan je voor, met onze  
beginnerscursussen als aanvulling  
van de traditionele Vespero 3000 en  
vervolgkursus. Tot binnenkort!

Marc

En, o ja, je kunt al je lidgeld voor  
2007 betalen, dan krijg je nog de  
tarieven van 2006 (hiernaast)!


Kunlaboris, alfabete:

Marc Vanden Bempt (porokaza  
redaktoro), Nele Hiers (nalezen), la  
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

## Arto-Ŝoko

Bela plikompletigo de niaj kursoj: Unika lingvokurso surbaze de la vivo kaj arto de la granda pentristo **Vincent van Gogh**.

La kurso celas evoluigi la kompren- kaj parolkapablojn, sed ekzercigas ankaŭ gramatikajn elementojn. Oni riĉigas sian vortostokon rilate al arto, naturo, filozofio, sed ankaŭ pri malsano, geografio, astronomio kaj pri ĉiutagaj temoj.



Kadre de la kurso oni partoprenas ilustritajn prelegojn, solvas komprenekzercojn, diskutas, faras rolludojn, aranĝas vivpenraĵojn, rolas en aŭkcioj, detektivas pri falsigoj, tradukas tekstojn, priskribas penraĵojn, ĉiĉeronas en artgalerioj (veraj kaj kreataj de ni).

**Instruas: Katalin KOVÁTS**

Por partopreni oni bezonas neniun artotalenton, eĉ ne kompreni kaj ŝati Van Gogh – tio venos dum la kurso!

Kadre de la programo ni enrigardas ankaŭ en la koncernan - kaj el arthistoria vidpunkto tre gravan - periodon, traktas verkojn de aliaj pentristoj.

La kursoserio de entute 36 horoj okazos en **Louvain-la-Neuve - Belgio** dum **tri semajnfinoj: 11-12 nov., 2-3**

**dec. 2006 kaj 20-21 jan. 2007**. Inter ili koresponda studo kaj hejma laboro.

La partoprenantoj estas petataj kunpreni unu el siaj ŝatataj penraĵoj (ankaŭ kopioj taŭgas☺), pentritan en la 19a jarcento.

Konsilatas partopreni ĉiun eron, sed nepre la komencon. La kandidatoj estu minimume komencintoj, sed eĉ progresantoj ne enuos!

Kursokotizo: 150 eŭroj (manĝoj, tranoktoj ne estas inkluditaj)

Pri organizaj aferoj kontaktu Alain Delmotte: [esperanto@swing.be](mailto:esperanto@swing.be) / Tel: +32 10 45 44 44. Pri la enhavaj demandoj turnu vin al Katalin Kováts: [katalin.kovats@wanadoo.nl](mailto:katalin.kovats@wanadoo.nl) ■



## Het overdenken waard

- ☆ Hoe een vis aan de lijn krijgen? Zeg hem dat er telefoon is.
- ☆ "Bevalt de nieuwe secretaresse?" " Ja zeker, maar we weten nog niet van wie."
- ☆ Pas maar op voor mij, zei het klontje tegen de biet, ik ben geraffineerd.
- ☆ Van mensen, die nooit wat geven, daar krijg ik wat van
- ☆ Gifgas: als het licht op groen springt.
- ☆ Als hij niets anders te eten had, leefde Godfried van bouillon.
- ☆ Ik zou Van Klaveren van harte door de ruiten kunnen schoppen.
- ☆ "Schat, ik heb je gemist." fluisterde hij. En hij dacht bij zichzelf: "Volgende keer zal ik beter mikken."
- ☆ Jan met de pet volgt zijn leiders klakkeloos.
- ☆ Toen de toerist in het Engelse postkantoor een postzegel vroeg kreeg hij een stamp.
- ☆ Toen ik de prijs van de sla zag kreeg ik een krop in de keel.
- ☆ Er zijn puntjes die niet graag hebben dat het paaltje erbij komt.
- ☆ In de Middeleeuwen kon men al goed rekenen, vooral vierendelen.
- ☆ Roken: het blijft een teer onderwerp.
- ☆ Sla nooit een man met een bril. Sla hem met je vuist, dat komt harder aan.
- ☆ Huur vind ik goed. Te huur is overdreven.
- ☆ Zegt de ene kaars tegen de andere: "Willen we vanavond samen uitgaan?"
- ☆ Waarom heet een vlieg een vlieg en een vis geen zwem?
- ☆ Als niemand perfect is, wie is dan niemand?
- ☆ Als piepschuim wordt vervoerd, waarmee wordt dat dan verpakt?
- ☆ Waarom denken vrouwen steeds aan seks wanneer ik zeg dat mannen maar aan één ding denken?
- ☆ Wat zouden sterren wensen als ze vallende mensen zouden zien?
- ☆ Als Amerikanen bij een trouwpartij rijst gooien, gooien Chinezen dan hotdogs?
- ☆ Waarom zeggen de mensen bij een sterfgeval altijd: "Dat is het leven"
- ☆ Hoe weten kaalhoofdigen die hun gezicht wassen waar hun gezicht precies ophoudt?

**Opdracht:** vertaal deze woordspelingen maximaal naar het Esperanto. Probeer dan eens een andere taal. Welke is het best geschikt? ■





## Ĉu vi sciis ke...

...la Sinjoro venis al Noa en la jaro 2006.

La tero estis maldeciĝinta kaj tro plena je homoj.

La Sinjoro malsuprenvenis kaj donis al Noa la ordonon konstrui Arkeon kaj savi du ekzemplerojn de ĉiu vivanta kreaĵo kune kun kelkaj bonaj homoj. "Jen la plano", diris Dio. "Rapidu, ĉar post ses monatoj ekpluvos dum 40 tagoj kaj 40 noktoj. Frank De Boosere ne scios kiel tion klarigi kaj denove nur inventos iun rakonton."

Ses monatojn poste ekpluvegis. La Sinjoro rigardis malsupren kaj vidis Noa plorante en sia inundita ĝardeno, sed li ne vidis Arkeon.



"Noa", Li tondre kriis, "kie estas mia Arkeo?"

"Pardonu min, Sinjoro", Noa petegis.  
"La aferoj ja sufiĉe ŝanĝiĝis kompare al la malnovaj tempoj.

Mi bezonis specialan konstrupermeson. Kaj mi devis diskuti kun la inspektoro kadre de fajroasekuro.

Miaj najbaroj asertis ke mi transiris la konstrulinion per mia Arkeo kaj ke mi

ne respektis la maksimuman konstrualton. Ankaŭ ili deponis plendon pro troa bruo en la konstruejo.

Ni devis iri al la servo pri Urbokonstruo por decido. Tiam venis la Ministerio pri Trafiko kaj la servo pri Pontoj kaj Vojoj. Ili volis ke mi pagu garantisumon por la eblaj, estontaj kostoj de modifado de la infrastrukturo kiam la Arkeo devos esti translokigata al la maro.

Mi asertis ke la maro venos ĉi tien, sed ili tute ne kredis min.

Akiri lignon estis alia problemo. La verduloj protestas kontraŭ la hakado de enlanda ligno, kaj tio por protekti la makulitan arbaran strigon. Mi provis konvinki la naturistojn ke mi bezonis la lignon ĝuste por savi tiun strigon.

Ili ne volis aŭskulti min!

Mi kolektis la bestojn. Sed tiam mi estis akuzita de Gaia. Michel Van Den Bossche asertis ke mi gardis kaptitajn sovaĝajn bestojn kontraŭ ilia volo. Ankaŭ ili argumentis ke la restadejoj estas tro malgrandaj kaj ke estas kruele kaj nehome gardi tiom multajn bestojn en tiom malgranda spaco.

La Ministerio pri Vivmedio decidis ke mi ne rajtis konstrui Arkeon antaŭ ol verki Raporton pri Efiko al la Medio pri via aŭgurita akvoflugego.

Intertempe mi daŭre okupiĝas pri plendo de la Centro pri Egalaj Ŝancoj kaj batalado kontraŭ rasismo.

Laŭ ili mi devas laborigi difinitan nombron da eksterlandanoj por konstrui la Arkeon. Aliflanke la sindikatoj postulas ke mi laborigu nur membrojn de la sindikato kun sperto pri la konstruado de Arkeoj.

Por eĉ pligravigi la aferojn, la servoj pri Dogano kaj Impostoj postulis ĉiujn miajn posedaĵojn kaj investojn. Ili asertas ke mi volas kontraŭleĝe forlasi la landon kunprenante endanĝerigitajn bestospeciojn. Kaj kiam oni en la Ministerio pri Agrikulturo aŭdis pri tiom da bestoj, ili komencis argumentaĉi pri la Sterko-Agad-Plano kaj demandis ĉu mi neniam aŭdis pri tiu SAP kaj kion mi faros pri ĝi.

Kaj tiam mi nur silentu pri la problemoj kiujn kaŭzis la influado de ĉiuj tiuj politikistoj kiuj, pro sia servado al popolo, ĉiuj havis iun kiu devis kuniri en la Arkeo.

Do Sinjoro, pardonu min, mi bezonos minimume dek jarojn por konstrui tiun Arkeon."

Subite haltis la pluvado, la ĉielo heliĝis kaj la suno denove ekbrilis. Belega ĉielarko etendiĝis ĉe la horizonto.

Noa mirigite suprenrigardis: "Ĉu tio signifas ke vi ne detruos la mondon?", li demandis.

"Ne", diris la Sinjoro, "via registaro jam intense laboras pri tio."

Amen.

*Solena deklaro: la fakto ke tiu ĉi fabelo aperas semajnon antaŭ politikaj elektoj en Belgio estas pura hazardo.* ■



## Fino?

### *Utopia*

Ej, kio okazas? Ĉu povas esti vera tiu sciigo ke baldaŭ ne plu aperos ĉi tiu revuo? Tio ja ne eblas! Jam de 27 jaroj ĝi trafas mian poŝtkeston. Tiu estas sufiĉe granda por akcepti tiun revuon dum ankoraŭ multaj jaroj.


En ĝi aperis jam pli ol kvindek paĝoj kun ĉi tiuj sensencaĵoj kiujn mi preskaŭ ĉiun fojon metas sur paperon. Kion mi faros per miaj pripensoj se ne plu mi ricevos ĉi tiun paĝon ĉe la fino de ĉi tiu revuo por ilin aperigi? Kie do ili aperu? Jen aperos truo en mia vivo. En la komenco de la serio mi dubis ĉu eblus plenigi tiun paĝon sen ĉeso kaj nun mi dubas ĉu eblos plenigi la vivon sen tiu paĝo. Nu, ne vere, mi iom troigas.

Sed mi ne troigas se mi kredas tiun malaperon grava problemo por nia asocio. Multaj gemembroj ne aperas en la kunsidoj. Jes tio mem estas ege bedaŭrinde, sed fakto. Por ili do la revuo estas la ĉefa, se ne eĉ la nura ligo kun la asocio. Se malaperas la revuo, tiam baldaŭ malaperos la ligo kaj iom poste malaperos la membroj.

Asocio sen membroj, klaras ke tio ne havas tro da senco, do fine malaperos la asocio mem. Ĉu tia do la fino? Ne, mi vere ne troigas.

Ne eblas ke neniu el niaj membroj trovos la tempon kaj emon por transpreni la redaktorecon. Kelkaj jam redaktis ĝin, eĉ dum jaroj, alia nun aperu kaj transprenu ĝin. Malfacile ne estas, necesas nur porcio da libera tempo kaj precipe porcio da sento pri respondeco por ĉiun fojon liveri finpretigitan numeron prespretan. Tio signifas ke oni petu al diversaj homoj verki artikolojn, kelkfoje aldonas artikolon mem, informiĝas pri la programo aperonta en la unua paĝo ktp. Sed mi certas ankaŭ ke la antaŭa redaktorino volonte kaj plene entuziasme disponigos siajn spertojn kaj sciojn por ke la nova sukcese transprenos la taskon.

Komenciĝas novaj kursoj ekzakte nun, homoj bezonas nian asocion. Ĉu do ĝi siavice ne havas la respondecon sin mem revivigi kaj daŭrigi siajn servojn? Ŝajne jes. Mi esperegas ke baldaŭ, tre baldaŭ aperos la blanka kavaliro kiu pretos transpreni ĉi tiun gravan redaktan taskon. Same tiel nova kursgvidanto ĵus transprenis la instruadon! ■



België – Belgique  
P.B.  
3000 Leuven 1  
2/2668

# Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift  
Oktober 2006

jr. 27 nr. 5

Dumonata revuo  
Oktober 2006

V.U. Goris Roger, R. Menadastraat 44, 1320 Hamme-Mille Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero :

Arto-ŝoko  
Het overdenken waard  
Onze cursussen  
Ĉu vi sciis ke...?  
Utopia

**Kijk naar de cursusinformatie  
in het midden van dit nummer!**

**Nodig je vrienden uit,  
ze zullen je dankbaar zijn voor de tip**



GRANDA MERKATO - FASADOJ - LEUVEN

## Programma Esperanto 3000 vzw

Alle activiteiten vinden plaats in het cultureel centrum 'Romaanse Poort', Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, tenzij anders vermeld. Het programma van de Vespero 3000 begint om 20 uur, welkom vanaf 19.30 uur

Di. 5/12 Wo. 19/12	<b>Wekelijkse avondcursus</b> Esperanto (lesgever: Ivo Schenkel), Winksele. <u>Examen: 19.12</u>	19.30 - 22.00
Wo. 13/12	<b>Zamenhof-Vespero 3000:</b> Venezuelo, lando de ekstremoj (Ivo Schenkel) = met foto's en ander materiaal. En met onze gratis Zamenhof-taart!	19.30 - 22.30

### ek al 2007 !

Wo. 10/1	<b>Vespero 3000:</b> filmaj dokumentoj pri Esperanto en televido kaj filmlernejo	19.30 - 22.30
Wo. 24/1	<b>Vervolgcurus Esperanto</b>	20.00 - 22.00
Wo. 14/2	<b>Vespero 3000:</b> programo anoncota	19.30 - 22.30
Wo. 28/2	<b>Vervolgcurus Esperanto</b>	20.00 - 22.00

**ESPERANTO 3000**

revuo de Esperanto 3000 vzw Leuven,  
asocio por LEUVEN kaj ĉirkaŭaĵo  
aperas 6-foje en la jaro

**Kontaktadreso / Contactadressen**

esperanto3000@esperanto.be  
Baron Descampsiaan 77, 3018 Wiggmaal  
Roger Goris (sekr.), Rue Ménada 44, 1320  
Hamme-Mille ☎ 010 860 112;  
r.goris@versateladsl.be  
Frans Croon (voorz.), Bukestraat 16,  
1910 Kampenhout-Buken ☎ 016 655 944;  
frans.croon@kampenhout.be

**Membreco / Lidmaatschap E. 3000**

membro/lid Eo3000 + FEL = € 25,00 =  
Eo3000, Horizon-taal, JEN (ĝis 29-jara)  
**nieuwsbrief** = gratis: zie onze webstek  
http://www.esperanto.be/esperanto3000/

**Membreco / Lidmaatschap UEA**

membro/lid UEA = € 9,00  
same/idem + jarlibro = € 22,00  
same/idem + Esperanto € 56,00

**Abonoj / Abonnementen (2005)**

Esperanto 3000 = € 12,50 (nl/eo)  
(alleen voor FEL-leden via andere clubs)  
Horizon-taal = € 25,00 (nl/eo)  
Monato = € 46,00, por ĉiuj (eo)  
Ret-Monato = € 27,60, por ĉiuj (eo)  
Agenda "La Jaro" € 5,00 (eo)  
Enigmo € 4,50 por 2 numeroj (eo)  
Vertikale = € 5,00, por aktivuloj (eo)  
Esperanto (UEA) = € 36,00 (eo)  
Juna Amiko = € 14,00, por infanoj (eo)  
Ret-info = € ?? (eo)  
La gazeto (OSIEK) = € 28,00 (eo)  
La Kancerkliniko = € 22,00 (eo)  
Kontakto = € 22,00, komencantoj (eo)  
Komencanto = € 18,00, komencantoj (eo)

**Reklamo / Reclame**

1 p. € 10, 1/2 p. € 6, 1/4 p. € 4, 1/8 p. € 3  
5x la prezo: tuta jaro / 5x de prijs: heel jaar

**Ĝenerale / Allerlei**

Pagante bonvolu klare indiki la deziratajn  
kategoriojn / Gelieve bij betaling duidelijk  
de gewenste categorieën aan te geven.

Konto/rekening : 734-3331944-03 de/ van  
Esperanto 3000 vzw, 3000 Leuven

Pri tekstoj nur la sendintoj respondecas / Voor  
teksten zijn alleen de inzenders verantwoordelijk

De la (lastfoja) redakcio

Dag mensen allemaal,

Dit was het dan: je hebt het  
allerlaatste nummer van Esperanto  
3000 in de hand.

Na 27 jaren zonder onderbreking  
moeten we het opgeven, bij gebrek  
aan een vrijwilliger voor de  
redactie.

Het doet pijn, maar zo is het.  
We verliezen weldra onze post-  
licentie, tenzij we een mini-nummer  
blijven maken en sturen. Ons  
regelmatige ritme en onze lezers  
verliezen we in elk geval.

Optimistisch zijn we niet meer.

We rekenen nu op jou om je lidgeld  
te vernieuwen en Esperanto 3000  
niet in de steek te laten. De  
vereniging heeft je hard nodig!

Je vindt het formulier in het midden  
van dit nummer.

Marc

Kunlaboris, alfabete:

Marc Vanden Bempt (lastfoja  
redaktoro), Nele Hiers (nalezene), la  
aŭtoroj (vidu ĉe la artikoloj).

## Ziek

In ons vorig nummer riepen we op voor een nieuwe redacteur voor dit tijdschrift. Niemand daagde op.

En dus is dit het laatste nummer van dit tijdschrift.

Esperanto 3000 is nu wel erg ziek.

Dit tijdschrift is naast Horizontaal voor veel leden het enige bindmiddel. In de toekomst wordt dat dus alleen nog Horizontaal. Toch roepen we je op om opnieuw lid te worden. Het kan nu, d.m.v. een luttele 25,- euro aan Esperanto 3000. Je toont zo dat je achter de idee van Esperanto staat. Je wordt of blijft lid van de grote internationale gemeenschap die achter dezelfde idee van een neutrale tweede en internationale taal staat.

En misschien voel je op zekere dag wel de drang om een stap verder te gaan en actief te worden in die grote Esperantowereld. Esperanto 3000 is hier voor jou. Een vereniging met veel potentieel, maar eventjes zonder de mensen die dat potentieel tot zijn recht kunnen laten komen. Misschien neem jij wel het heft in handen?

Welk potentieel ligt er dan? Een boekendienst met meer dan 100 titels in voorraad en een voldoende financiële reserve om die voorraad zelfs uit te breiden. Een aantal eigen uitgaven. Een spaarrekening, die toelaat ambitieuze doelstellingen te ondersteunen. Een eigen tijdschrift, al gaan het nu wel even zijn licentie bij de Post verliezen. Een trouwe ledenbasis. Een goede naam bij de stedelijke overheid en administraties. Een erkenning door de stedelijke cultuurraad, met de bijhorende jaarlijkse subsidie. Internationale contacten. Tweewekelijkse bijeenkomsten en enkele cursussen per jaar. Een uitgebreide eigen bibliotheek. En nog meer.

Dat allemaal wacht op jou. Ja, jij. Voel je aangesproken. Jij kan samen met enkele mensen de stimulans zijn die Esperanto 3000 nodig heeft om uit een dal te klimmen en terug uitdagingen aan te gaan.

Dit is altijd een ambitieuze vereniging geweest, getuige de organisatie van het Wereld-Jongerencongres meteen na de oprichting van de vereniging, met een budget van meer dan een miljoen frank.

De uitdagingen liggen klaar, neem jij ze op?

Zeg het aan Frans (016 655 944), zeg het aan Roger (010 860 112), zeg het aan Ivo (016 890 480), of aan een ander bestuurslid. Of laat het weten aan [esperanto3000@esperanto.be](mailto:esperanto3000@esperanto.be).

Esperanto 3000 is ziek: zal het genezen of sterven? ■

## 13-12-2006: Venezuelo

Kiam oni mencias la landon Venezuelo, la publiko ĝenerale pensas pri petrolo.

Tamen Venezuela estas ne nur nigra oro. Venezuelo estas ankaŭ ĝoja muziko, ridanta loĝantaro, belaj plaĝoj kaj belaj knabinoj, sed pli ol tio: ĝi entenas la plej malnovajn pejzaĝojn de nia planedo, plurajn homfaritajn kaj naturajn rekordojn, resume ĝi estas "lando de ekstremo".

Lasu vin mergi en tute specialan etoson dum la Zamenhofa Vespero de Esperanto 3000, merkredon la 13-an de decembro de 2006 kaj venu revi kun ni pri tropika nemalkovrita paradizo.

Okaze de la Zamenhofvespero estos senpaga torto por ĉiuj ĉeestantoj. Ankaŭ nemembroj bonvenas.

Merkredon/Woensdag 13.12.2006

19:30 - prelego/voordracht 20:00 precize/stipt. "30CC" - Kultura Centro "Romaanse Poort" - Brusselsestraat 63, Leuven



Wanneer men het land Venezuela noemt, denkt het publiek in het algemeen aan olie.

Toch is Venezuela niet alleen zwart goud. Venezuela is ook blije muziek, een lachende bevolking, mooie stranden en mooie meisjes, maar ook meer dan dat: het heeft ook de oudste landschappen van onze planeet, verschillende door de mens gemaakte en natuurlijke records, het is kortweg een "land van uitersten".

Laat je onderdompelen in een heel speciale sfeer tijdens de Zamenhofavond van Esperanto 3000, op woensdag 13 december 2006, en kom met ons meedromen over een nog niet ontdekt tropisch paradijs.

Ter gelegenheid van Zamenhofavond is er gratis taart voor alle aanwezigen. Ook niet-leden zijn welkom. ■

### Niaj sudokoj

*Sudoku = en po ĉiu linio, kolumno kaj kvadrato skribu ĉiujn ciferojn de 1 ĝis 9.*

solvoj: vidu paĝon 14

			5		3		8	
6							9	
5		7		6	8			3
				3		8		5
	2		1			3	7	
	8		4		2			
		4	7		6			
		3				9	6	
								7

2				1	6			
	6				5	2	3	
		9						
	3		8	7		6	2	
7				4				8
					2		5	
5		2	7			3	6	
				5			4	
	1		6		4			9

Okdek pliaj sudokoj  
 haveblas en la  
 eldonaĵo  
*"Sudokoj /  
 Naŭopumoj"*  
 de FEL

Havebla en la  
 libroservo de  
 Esperanto 3000

## Sensenca esplorado

*Mi estas kontraŭ senenca... esplorado.*

"La plej forta muskolo en la homa korpo estas la lango." (*kaj do?*)

"Se vi dum 8 jaroj, 7 monatoj kaj 6 tagoj krius, tiam vi estus produktinta sufiĉe da sonenergio por varmigi tason da kafo." (*do ne vere valoras*)

"Se vi dum 6 jaroj kaj 9 monatoj furzus, tiam vi estus produktinta sufiĉe da energio por egaligi atombombon." (*tio jam pli valoras*)

"La orgasmo de porko daŭras 30 minutojn." (*en mia sekva vivo mi volas ĝi porko*) (*kiel oni esploris ion?*) (*Kaj kial? Fakte mi ankaŭ ne volas scii tion*)

"Se vi kun la kapo frapas al la muro, vi uzas 150 kaloriojn en horo." (*mi daŭre pensadas pri tiuj porkoj*) (*cetere: ne provu tion hejme, eble prefere jes en la oficejo?*)

"Homoj kaj delfenoj estas la nuraj specioj kiuj amoras pro plezuro." (*do tial Flipper ĉiam tiel ridadis!*) (*sed porkoj havas orgasmojn dum 30 minutoj, tio ŝajnas ne honesta*)

"Dekstramanaj homoj vivas mezume 9 jarojn pli longe ol maldekstramanaj." (*se vi estas dumana, ĉu vi rajtas mezumigi ambaŭ aĝojn?*)

"Formiko povas porti 50-foje sian pezon kaj treni 30-foje sian pezon kaj ĝi ĉiam falas sur la dekstra flanko post venenigo." (*oni ja devas ion esplori?*)

"Polusaj ursoj estas maldekstramanaj." (*kiu tion sciis?*) (*al kiu gravas?*) (*kaj kiom longe do ili vivas?*)

"Siluro (= *nl meerval*) havas almenaŭ 2.700 gustopapilojn." (*kio estas gustuminda sur rivera fundo?*)

"Pulo povas salti 350-oble sian propran korpolongon. Komparu: por homo tio signifas salto trans 7 pilkoludkampoj." (*30 minutoj, ja nekredeble? Kaj kial porko?*)

"Blato povas vivi dum 9 tagoj sen sia kapo. Poste ĝi mortos pro malsato." (*na, aĉe*)

"Vira preĝa manto (= *nl bidsprinkhaan*) ne povas amori kiam ĝia kapo ankoraŭ estas sur la korpo. Tial la inoj montras ke ili volas amori mordante lian kapon de la korpo." (*karulinjo, mi estas hejme... oh-o*)

"Kelkaj leonoj amoras pli ol 50-foje en tago (*mi en mia sekva vivo plu volas esti porko: kvalito pli gravas ol kvanto*)

"Papilioj gustumas per siaj kruroj" (*komparu al tiuj siluroj*)

"La okulo de struto estas pli granda ol ĝia menso." (*mi konas homojn al kiuj tio ankaŭ validas*)

"Marstelo ne havas menson." (*mi konas homojn al kiuj tio ankaŭ validas*)

*Post ĉio tio mi povas konkludi nur la jenon: feliĉuloj, tiuj porkoj.* ■











## Universala Kongreso - Florenco 2006

*Ivo Schenkel*

Filino Sandra kaj mi partoprenis la Universalan Kongreson. Ni vojaĝis aviadile al Bolonjo, kaj poste trajne al Florenco. Nia hotelo troviĝis je 200 metrojn de la stacidomo, proksime de la kongresejo, do ni povis fari ĉiujn translokadojn piede, dum la tuta kongreso.

Ĉar estis nia unua kongreso, ni unue partoprenis kiel decas, la kunvenon por unuafojaj kongresanoj, kaj poste kurioziĝis inter la diversspecaj budoj dum la Interkona Vespero.

La duan tagon, post la solena malfermo, ni vizitis la libroservon, kaj dum la tuta kongreso ni ripetis tiujn vizitojn plurfoje.



Dum la kunveno de ILEI (Esperantaj Instruistoj), mi aŭdis pledon por havigi al instruistoj diplomon disdonitan de ILEI.

Sekvis diskuto, pri tio ke nacinivele ĉiumaniere tiuj diplomoj ne multe validus sen validigo far la loka ministerio pri edukado. Poste oni parolis pri venontaj kongresoj, oni prezentis diversajn funkciulojn kaj parolis pri la enskriboj al la ekzamenoj dum la kongreso.

Poste ni ĉeestis koncerton de la grupeto Viro kaj Virino, kaj sekvis la Nacia

Vespero, parte en la urbocentro kaj parte en la ĉefa salono Zamenhof.



London en la kadro de Kleriga Lundo mi ĉeestis kune kun pliaj 150 personoj tre interesan prelegon de Humphrey Tonkin kun Wera Blanke pri “La Arto Paroli Publike”. Tonkin demonstris kaj klarigis plurajn aspektojn de la bona parolado, ne nur en have sed ankaŭ forme, kaj estis forte aplaŭdata por sia lerta interveno.

Poste 76-jara Tereza Kapista parolis pri siaj spertoj en Burundo kie ŝi ne iris nur por instrui Esperanton, sed ankaŭ por konstati la sanstaton de la lokaj infanoj kaj rezulte starigi fondaĵon por plibonigi la katastrofan situacion de la vizitita vilaĝo. Daniele Binaghi parolis pri sia vojaĝo tra Sudameriko kaj siaj kontaktoj kun la Esperanto-mondo en Peruo, Paragvajo kaj Brazilo.

Kelkfoje mi akompanis mian filinon al la paroligaj kursoj gvidataj de la ege sperta instruistino Katalin Kovats. Sandra interkonis kun pluraj junuloj, kun kiuj ŝi nun konservas amikecajn rilatojn.



Mardon okazis la publika interparolado kun la Akademio de Esperanto, kie oni submetis al la juĝo de la akademianoj interesajn kaj ankaŭ malpli interesajn demandojn. Cetere aperis pri tio artikolon en la oktobra numero de *Esperanto*.

Okazis posttagmeze tre bela koncerto de Ĵomart kaj Nataŝa kaj ilia naŭjara filino Carina.

Posttagmeze okazis la Terminologia Forumo, kie mi forprenis kelkajn dokumenterojn por estontaj kontaktoj.

Merkredon ni profitis de la bona vetero por viziti Florencon kaj iomete ripozi.



Dum la tuta kongrestempo estis agrable sperti kiel en ĉiu parto de la urbo oni renkontis esperantistojn en la stratoj kaj en restoracioj kaj vidindaĵoj.

Jaŭde ni ankoraŭ partoprenis diversajn kunsidojn, Sandra iujn, kaj mi aliajn, kiel tiun de la Verduloj. Posttagmeze okazis tre sukcesa teatraĵo "De Dante al Ĉeĥov", dum kiu la artisto deklamis el la verkaro de tiuj du verkistoj tekstojn tradukitajn en diversajn lingvojn, metante en ĉiuj la deklammanieron kaj la spiriton de la parolantoj de tiuj lingvoj, kio estis ĉiufoje tre amuza.

Vendredon posttagmeze mi dividis kun Frans la prizorgadon de la budo de Monato, kaj post la Solena Fermo sabate, ni ankoraŭ restis pluan tagon en Florenco por iom viziti la urbon. ■

### Gezocht: organisatoren voor Esperanto 3000

Kandidaten voelen zich geroepen een activiteit uit te bouwen en de nodige mensen te mobiliseren die taken opnemen, waarbij ze zelf het overzicht, de coördinatie, de motivering en de restaken in handen houden. Financiële en andere middelen zijn beschikbaar. Een organisatieplan wordt uitgewerkt samen met ervaren mensen. De beste kandidaten zijn doelbewust en beschikken over het doorzettingsvermogen en plichtsbewustzijn om genomen engagementen ten allen prijze waar te maken.

De vergoeding is louter immaterieel.

Kandidaturen indienen bij Roger (zie p. 2) of [esperanto3000@esperanto.be](mailto:esperanto3000@esperanto.be)

### Niaj sudokoj - solvoj

4	9	2	5	1	3	7	8	6
6	3	8	2	4	7	5	9	1
5	1	7	9	6	8	2	4	3
7	4	1	6	3	9	8	2	5
9	2	6	1	8	5	3	7	4
3	8	5	4	7	2	6	1	9
2	5	4	7	9	6	1	3	8
1	7	3	8	5	4	9	6	2
8	6	9	3	2	1	4	5	7

2	7	3	4	1	6	9	8	5
4	6	1	9	8	5	2	3	7
8	5	9	2	3	7	4	1	6
1	3	5	8	7	9	6	2	4
7	2	6	5	4	3	1	9	8
9	8	4	1	6	2	7	5	3
5	4	2	7	9	8	3	6	1
6	9	7	3	5	1	8	4	2
3	1	8	6	2	4	5	7	9

### Gezocht: redacteur voor dit tijdschrift

Kandidaten nemen het engagement op elke twee maanden een afgewerkt nummer af te leveren, met artikels die anderen aanleveren of aanvullend zelf geschreven worden. Het eindresultaat is een tekst in MS-Word, klaar voor druk. De nodige ondersteuning en standaard modellen worden gegeven door ervaren mensen.

De vergoeding is louter immaterieel.

Kandidaturen indienen bij Roger (zie p. 2) of [esperanto3000@esperanto.be](mailto:esperanto3000@esperanto.be)



## Adiaŭo

### *Utopia*


Ili kune sidis en la stacidoma bufedo. Silento inter ili, vortoj ne sonas. Liaj pakaĵoj ĉe la tableto, ŝiaj manoj leĝere sur la tablo tuŝas liajn karesetante. Tristo ŝvebas en la aero. Liaj pensoj ĝemas pri la sekvaj tagoj kaj semajnoj. Neniam antaŭe, de kiam ili renkontis unu la alian, ili tiom longe estis apartaj ol nun ili baldaŭ estos. Tra la jaroj iliaj vivoj interplektiĝis kaj interfandiĝis, Tagoj ordiĝis sciante ke ili ĉiun momenton estas kunaj aŭ almenaŭ tre proksimaj. Nur laborhoroj apartigis ilin, neniam pli ol deko da sinsekvaj. Ili sentis la alian kuna eĉ se ne en la sama ĉambro kaj ekster vida kaj aŭda distanco. La tagoj pasis, ili ne konsciis pri sia feliĉo ĉar tiel ĝi iĝis parto de la vivo, ĝis...

Ĝis venis tiu sciigo ke li devos forveturi pro sia laboro. Unu tago ne estus grava, sed tuj jam plurajn semajnojn li estos for, en loko tre malproksima kiun eĉ la tuttera reto ne jam atingis. Nur telefone li povos kontakti ŝin, almenaŭ voĉojn ĝi denove kunigos por kelkaj momentoj. Konstruprojekto tie bezonos lin kaj alternativo ne estis, li devis obei kaj tien veturi.

La vojaĝo komenciĝos per trajno, al flughaveno, de tie aviadilo forportos lin definitive foren kaj li ne jam sciis per kia transportilo li fine atingos la celon.

Tiel li pensas, en la stacidomo antaŭ la foriro, ambaŭ ili tiel pensas. Ŝi restos hejme, infanoj ŝin bezonas kaj ankaŭ mono ne estas por ke akompani lin. Tiel ili estos apartigitaj, nur en la lastaj tagoj ili klare ekkonsciis kian lukson ili havis ĝis tiam, ĉiun tagon kunaj. En la sekvaj semajnoj devige ili lernos vivi sen la alia. Ili ne sentos la varmon de la korpo de l'alia, ne povos ekstari kaj scii ke la alia tie sidas, proksima, preta aŭskulti zorgojn kaj ŝercojn, aŭ simple por tuŝi manon kaj scii ke la vivo estas bona. Li laboros tie, sed liaj pensoj certe restos ĉe ŝi kaj ĉe ilia hejmo. Ankaŭ ŝi imagos kie li estos, kvankam imagon ŝi ne havas pri tiu loko. Ŝi kreos sian propran imagon. Kaj fine, post reveno, li priskribos ĉion kaj ili denove estos kunaj en la sama pensa mondo kaj en la sama realo.

Adiaŭo nuna ne estos porĉiama, eĉ se hodiaŭ ili sentas ĝin preskaŭ tia. Li revenos kaj ĉio denove estos kiel antaŭe, la feliĉo de la kunestado revenos, feliĉe. ■



België – Belgique  
P.B.  
3000 Leuven 1  
2/2668

# Esperanto 3000

Tweemaandelijks tijdschrift

December 2006

V.U. Goris Roger, R. Menadastraat 44, 1320 Hamme-Mille

jr. 27 nr. 6

Dumonata revuo

Decembro 2006

Afgifte : 3000 Leuven 1

En ĉi tiu numero :

Ziek  
13.12.2006 - Venezuelo  
Niaj sudokoj  
Sensenca esplorado  
Aliĝilo 2007  
UK - Florenco 2006  
Utopia

**Blijf je Esperanto 3000 trouw?**

**Kijk in het midden van dit nummer**

**en word nu lid voor 2007!**